

# FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE  
77610 FONTENAY TRESIGNY  
FRANCE

# KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★  
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 - PARIS  
Skr.: S-ro R. DESPINEY 43, quai de Champagne 94170 - LE PERREUX-sur-MARNE  
Kasistino: S-ino J. VINCENT 26 bis, rue de Milngavie 49150 - BAUGE  
C.C.P. Association Catholique pour l' Esperanto 2324 93 N ROUEN.  
Française

==== la n°: 3 F. Abono: 13 F. Kotizo: 2 F. Sume: 15 F. ====  
xx

La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent antaŭ la 10-a de  
marto, junio, septembro kaj decembro.  
xx

---- N° 124 ---- BULLETIN TRIMESTRIEL ---- TRIMONATA BULTENO ----  
\*\*\* Sankta PIO X-a, preĝu por ni. \*\*\*

----- APRIL 1980 -----

xx

## BILETO DE LA PREZIDANTO.

Nous allons, selon la tradition établie, nous réunir en congrès. Nous vous convions, membres et amis de notre Association, à y venir nombreux, et à y inviter des personnes intéressées et désireuses de connaître notre action, nos buts. Mais aussi à faire que cette rencontre soit vivante, animée, et qu' elle reflète l' image de l' esprit qui, depuis le début de ce siècle, fait qu' il existe un mouvement espérantiste catholique, grâce notamment à l' Union Internationale Catholique Espérantiste (I.K.U.E.).

Par ses organigrammes internationaux, ses actions nationales ou régionales, ses sections spécialisées, l' Esperanto s' est répandu à travers le monde entier. Langue universelle, l' Esperanto est au service de toutes les activités humaines. La présence des chrétiens est aussi indispensable, dans ce mouvement, que celle de scientifiques, d' ouvriers, d' universitaires; parmi les nombreux périodiques, les livres de toutes sortes qui s' impriment et se lisent, une presse chrétienne, des courants ouverts au spirituel sont nécessaires.

Nous affirmons, d' autre part, que l' Eglise a, qu' elle aura de plus en plus besoin, à côté de la langue des textes sacrés conservée par la tradition, d' une langue pratique d' échange, d' une langue de contact direct, au delà de la diversité des langues nationales, et même de la multiplicité des langues canoniques et liturgiques; latin, grec, slavon, araméen, etc.

Vie des Eglises, oecuménisme, dialogue avec les non-chrétiens, tout est question de langage; la prédication, l' enseignement de la doctrine, les contacts internationaux de toute nature réclament un moyen de compréhension immédiate dans la clarté et la précision.

Radio-Vatican adresse au monde entier ses messages et ses informations en diverses langues; combien peu cependant, par rapport aux multiples langues et dialectes pratiqués dans toutes les parties du monde!

Mais tout ce que nous exposons ici est conditionné par la diffusion de la Langue Internationale, le développement de sa littérature, son utilisation généralisée dans les relations internationales, la pénétration dans tous les milieux de la forme de culture qui lui est propre.

../...





TIGRINO KAJ OGROKATO (fino)

"Strange," tiel pensis Tigrino, kiu sin kaŝante enrigardis la internon de la ĉeftemplo. "Ne povas esti, ke ili konas mian moknomon. Kredeble, ili menciis veran tigrinon. "Ŝi ŝirmis sian kapon kaj vizaĝon per la antaŭtuko kiel masko, kaj ŝteliris al la ringo de la dancantoj. Ŝi enmiksiĝis en Dek ses Araĥnatojn kaj kune dancis. Ŝajnis al ŝi, ke neniu rimarkis ŝin. Post sufiĉe longe Budho ĉesigis la dancadon kaj direktante sian nazon iom supren ekflaris ian odoron. "Odoras je fiŝaĵo! Ĉu iu fiŝspirito de la lago aliĝas al ni? Laodoro ion al mi rememorigas. Iam mi manĝegis fiŝaĵon ĉiutage." Budho gaje ekkantis:

"Ne min plu insultu, nomante min Kataĉo.  
Kataĉo povas surmeti getaĵojn sur du piedoj.  
Kataĉo povas apogi sin sur promenbastono.  
Kataĉo povas sinvesti per tinkturita banvesto.  
Miaŭ, miaŭ, njago, njan!"

La kovraĵon ĵetante ŝi kriegis: "Fi, Kataĉo! Mi venĝu la morton de mia fratino!"

Budho harojn hirtiĝis. Fulmorapide ŝi ekkaptis la nukon de Budho, ĵetegis lin kontraŭ la ĉefkolonon per la tuta forto. "Gjaŭo!" Budho ŝanĝiĝis al la nigra kato granda kiel hundo. Samtempe, dek ses savaĝaj katoj diskuris ĉien, kvazaŭ korvaro ŝtonon ricevinte.

La statuo de Budho sidis kaj Dek ses Araĥnatoj staris kiel antaŭe sur la alta podio. Mortis la kato, kiu prenis sur sin la formon de Budho.

La vilaĝanoj cindrigis la kadavron de la kato, kaj la cindron oni forĵetis sur malproksiman maron.

Tradukis kaj kompilis ZIN Kiyosi, el Japanlando.

=====

SKRIBAS LA LEGANTOJ

El letero, de Nederlando (sendas X. Dauchez):

... La normoj ege ŝanĝiĝis kaj la aferoj, kiuj jam estis akceptitaj de preskaŭ ĉiuj katolikoj nun estas diskutataj.

Ĉe en la episkoparo en nia lando regas malsamaj opinioj, kaj tial momente la sep episkopoj troviĝas en Romo, kie, sub gvidado de la Papo, ili klopodas ripari la unuecon.

Tio estas tre necesa, ĉar, pro la malsamo de opinioj en la prezidio, la kredantoj estas kiel ŝafoj sen paŝtisto. La sekvo estas, ke la "lupoj" havas libere ludon kaj la preĝejoj estas forlasitaj. Sed ĉu Jesuo ne mem antaŭdiris tion, kaj avertis nin? "Se oni diras al vi: "Ĉi tie estas Kristo" aŭ "Jen li estas" ne kredu tion." Ni daŭre preĝu unu por la alia.

... Mia edzino antaŭe sentis sin pli libera, kiam mi estis dum la tuta tago en mia metio. Kiam mi ĉiun tagon estas hejme, ŝi fariĝas nerva pri tio, kiel mi spertis. Nun, mi laboras lunde kaj merkrede, kaj ni ambaŭ sentas nin pli komfortaj.

=====

EN NIAJ GRUPOJ

La grupo de mesoservantoj de S-ta Klemento apud Sens, lerte daŭrigas sian lernadon. Nun deko da gelernantoj ĉiusabate venas por lerni je la dua ĝis la tria kaj duono. Ja, kelkaj, kiuj venis en la komenco ne plu venas, sed novaj prenas lokon. Lastan jaron, ni renkontiĝis en agrabla etoso kun la tre agema Troyes-a grupo kaj la 31-am de oktobro, niaj germanaj amikoj el Unterkirnach, kun pastro Eiŝkorn vizitis nin kaj invitis nin reciproke post Pasko en la Nigra Arbaro. Poste kelkaj el ni iros al Lourdes kun ili por la dioceza pilgrimado de Sens. Ni trovis bonan metodon "Esperanto por infanoj" pli efikan ol aliaj, kiujn ni uzis antaŭe.

Ni ŝatus korespondi en Esperanto kun aliaj katolikaj grupoj kiel la nia se estas tiaj en Francando!

- Lille-Roubaix-Tourcoing: kvindeko da gelernantoj progresas.

En Lille, ĉe la Dominikanoj, okazas monata Esperanto-diservo "Esperanto kaj kristana vivo".

=====

AL LA GRUPESTROJ KAJ KURSGVIDANTOJ

Por taŭge organizi viajn ekzamensesiojn, legu la "Programme et règlement" kaj la "Gvidlibro por la ekzamenoj de FEI"-n. Ambaŭ estas haveblaj ĉe S-ino J. Vincent, afrankite, kontraŭ 7 F al ŝia p.ĉ.k. NANTES 3254 10 R.

RADIO ROMA - ESPERANTO

ABORTO EN EUROPA KOMUNAJO (teksto de Ivo Murgia, trad. Antonio de Salvo)

La Eŭropa Parlamento, antaŭ nelonge elektita, vekis interesigon kaj espere rojn, kiuj naskiĝas el la sopiro je solvo de gravaj problemoj en pli larĝa dimensio; sed, kelkfoje, oni ne konscias, ke pri kelkaj aferoj la eŭropaj institucioj ne kompetentas. Ekzemple, pri iu problemo, kiu ĵus zorgigis la diversajn ŝtatojn, tiu de aborto, oni opiniis, flanke de kelkaj, ke oni povas korekti la naciajn leĝojn per direktivo de la Eŭropa Ekonomia Komunaro (EEK). La Eŭropa Parlamento okupis sin pri la demando, ĉar francaj socialista deputito pledis por harmoniigo de la diverslanda leĝaro pri aborto. La deputito celis, precipe, eviti la nunan trafikon de virinoj, kiuj iras de unu lando al alia serĉante pli favorajn leĝojn. La respondo estis, ke EEK ne kompetentas pri la temo. Antaŭ nelonge, ion similan ankaŭ diris S-ino Veil, Prezidantino de la Eŭropa Parlamento kaj eksa franca Ministrino pri Saneco, kiu deklaris, ke "kelkaj leĝaroj ne estas eksporteblaj". Fakte, saneco samkiel justico kaj lernejo, estas rezervitaj al la kompetenteco de la unuopaj ŝtatoj; kaj, en multaj landoj, la leĝaro pri aborto estas tute freŝa (tiu plej aĝa estas tiu brita de 1967), kaj ĝi respegulas vivkoncepton propran de la unuopaj landoj.

Drago

EPISKOPO AKTORAS (teksto de xxxxx, trad. Antonio De Salvo)

Monsinjoro Luigi Bettazzi, la agema kaj tre konata Episkopo de Ivrea (Piemonto, nordokcidenta Italio), debutis la 17-an de decembro, kiel aktoro, sur la scenejo de Teatro "Giacosa". Li ludis la rolon de Valmondo, kiu estis Episkopo de Ivrea, kaj do lia antaŭulo, antaŭ 900 jaroj, je la epoko de Ardueno, sinjoro de Ivrea kaj reĝo de Italio. Mons. Bettazzi ne surhavis la scenejajn vestojn, sed tiun ĉiutagan. Al la kritikistoj, li aspektis emociita, tiel ke li ankaŭ hezitis en la elparolo de kelkaj vortoj; al la publiko, male, li multe plaĉis.

\*\*\*\*\*

4-a INTERNACIA ESPERANTISTA PILGRIMTAGO al la VIRGULINO de la MALRICULOJ, REGINO DE LA NACIOJ en BANNEUX (Belgujo)

DIMANĈON, la 14-an de SEPTEMBRO 1980

- 9.00 (belga horo): akcepto kaj interkono, en la belega "INSTITUTO MATER DEI" (Banneux-Louveigné, apud Liège)
- 9.45: mallonga prelego de P. L. BOURDON kaj S-ro W.A. Van HEUGTEN kaj debato pri la temo de la pilgrimtago.
- 12.00: tagmanĝo
- 13.30: libera vizito al la Fonto "Por ĉiuj nacioj" kaj al la internacia kapelo S-ta Miĥaelo.
- 14.30: diservo kuncelebrata en Esperanto
- 15.30/16.30: lasta kunveno. Konkludoj de la tuta pilgrimtago, fotoj, kantoj, adiaŭo

- NOTOJ:
- 1) partopreno en la lupreno de la salonoj kaj en la organizo: 120 BF aŭ 18 FF aŭ egalvaloro en aliaj valutoj, pagotaj surloke
  - 2) ebleco tagmanĝi, moderpreze, en memserva restoracio
  - 3) ebleco tranokti eĉ en la Instituto mem, antaŭ kaj/aŭ post la pilgrimtago (bonvolu rekte informi la estrinon de la Instituto, almenaŭ kelkajn semajnojn antaŭe)
  - 4) venu kun multaj familianoj kaj amikoj interŝanĝi kaj preĝi kaj ĝoje interkoni en internacia etoso!
  - 5) inf. P. L. BOURDON? dominikano, 7, av. Salomon 59800 - LILLE tel. (20) 55 00 82 matene.

\*\*\*\*\*

DIVERSAJ INFORMOJ

NOVA STRATO ZAMENHOF en HENIN-BEAUMONT (Pas-de-Calais)

NOVA LEĜPROpono celanta enkonduki Esperanton kiel nedevigan lingvon en la duagrada kaj superan instruadon estis prezentita ĉe la nacia asembleo la 19-an de decembro 1979 de 114 deputitoj, plej multe el la socialista partio.

AGAPO

Ĉiuj kredantoj kunaj havas ĉion kuna,  
Disdividas inter si laŭ aparta bezono,

Laŭdante la Sinjoron per samdiapazono:  
Senĉese fortiĝas la Eklezio nuna.

Ili forĵetas skismon pro amo oportuna  
Kaj preĝas solan Patron sen gorda monotono,  
Sin rokas sur Jesuo vivanguleca ŝtono  
Kaj ĝojas en Spirito far helo lume suna.

La tre sanketa nutraĵo prenita kun kredkanto  
Meze de la frataro estas sur marŝetapo  
Vere forta impulso sen energia manko.

Ili trinkas la sangon de la sanktgrega kapo  
Memorante la akvon fluan de lia flanko  
Dum la surtera manĝo al ĉiela agapo.

DEGRELLE Roger 16/2/1978.

+++++  
KONGRESA PROGRAMO (aldonoj kaj ŝanĝoj)

- la diservo okazos sabaton vespere
- en la dimanĉa vespero, iu ĉeestanto prezentos lumbildojn
- lundon matene, ebla diservo kaj daŭrigo de la debato; ebleco tagmanĝi

RESTADPREZOJ

Jen la detaloj, kiuj atingis nin post la apero de la januara bulteno:  
vespermanĝo: 18 F; tranokto: 11 F; matenmanĝo: 6 F; tagmanĝo: 20 F.

ALVENO EN SENS (trajne) sabate

Forveturo el Paris-Lyon	12.45	13.42	18.56
Alveno en Sens	13.40	15.18	19.50

REVENO EN PARIS

dimanĉe

lunde

Forv. el Sens	16.57	17.48	20.27	21.19	8.03	16.57
Alv. Paris-Lyon	18.36		21.29	22.46	9.03	18.36
Alv. Paris-Bercy		18.52				

-----  
Rapide aliĝu, ĉar la monaĥinoj deziras koni la nombron de siaj gastoj kiel eble plej frue. Ne atendu la limdaton! Pliajn aliĝilojn vi povas peti de S-ino Vincent. Amase partoprenu!!

Ĝ I S R E V I D O E N S E N S ! !

+++++  
FINANCA RAPORTO POR LA JARO 1979

ENSPEZOJ

!

ELSPEZOJ

Kotizoj	3 226,50	!	Bulteno	920,52
Donacoj	947,04	!	Eldono libro	1 000,00
Rentumo ŝparkaso	40,51	!	Korespondado	553,90
		!	Vojaĝoj	664,25
		!	Diversaj	262,70
	<u>4 214,05</u>	!		<u>3 401,37</u>

Pozitiva saldo la 31/12/79 812,68

En la kaso la 1/1/79 1 229,53

Pozitiva saldo la 31/12/79 2 042,21



KOTIZTABELO 1980

IKUE kun "Espero Katolika" . . . . . 52 F  
Peranto: R. Degrelle c.c.p. NANCY 2 555 38 L.

\*\*\*\*\*

ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" . . . . . 15 F  
Infanoj ĝis 16-jaraj, pastroj, religiul(in)oj . . . . . 7,50 F  
Bonfaranto . . . . . 75 F  
Dumviva membro . . . . . 300F

-----

UFE kun "Revue Française" . . . . . 90 F  
UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro . . . . . 120 F

-----

Abono al "Biblia Revuo" . . . . . 36 F  
Assoc. Cathol. Franç. pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2324 93 N.

xx

Dépôt légal: 2ème trimestre 1980 !! Polycopié par F. M. C.  
Papier de presse n° 62 532 !! Prieuré St-Martin La Houssaye-en-Brie  
Directeur-gérant: Gaston Véron !! 77610 - FONTENAY TRESIGNY FRANCE